



## Meksiko jam atendas nin por la 5-a Tutamerika Kongreso de Esperanto en 2001!

Informas nia komisionano Leonor Torres kaj Angel Segura, nova ĝenerala sekretario de Meksika Esperanto Federacio, ke meksikaj esperantistoj intense laboras por aranĝi la 5-an Tutamerikan Kongreson, en Meksik-urbo. La periodo jam estas fiksita: **de la 15-a ĝis la 21-a de Aprilo, 2001**. Oni planas postkongresan ekskurson al Oaxaca.

Meksika Esperanto Federacio (MEF) informas pri la kotizoj:

Aliĝperiodoj	Kotizo (usonaj dolaroj)
ĝis majo 2000	40
de junio ĝis decembro 2000	60
ekde januaro 2001	80

Krome, la kotizo de 40 usonaj dolaroj validos ĝis decembro/2000, se **samtempe** aliĝas **grupo de 5 kaj pli personoj**.

Baldaŭ pliaj aktualaj informoj estos disponeblaj ankaŭ en la paĝoj de MEF:

<http://www.el-tecolote.com/esperanto>

Ĝiu intereso povas komunikii kun MEF pere de la jena adreso:

Meksika Esperanto Federacio  
Apartado Postal M-10576  
MX-06000 - Mexico, D.F.  
MEKSIKO  
kaj retropte tra [gelar@data.net.mx](mailto:gelar@data.net.mx)

### Karaj legantoj!

*Jen vi trovas pliajn informojn el la tuta Ameriko. Oni senaese trovas novajn agadkampojn, en la spirito de regiona integriĝo. Ies solvo fariĝas aĝes solvo. Kaj ies vizito estas aĝes oĝo, kiel vi konstato el la dua parto de raporto de nia ege kunlaborema Bill Maxey pri lia vizito al Suda Ameriko. Tion espereble ankaŭ vi faros en 2002, por la UK en Fortaleza, Brazilo.*

*Nome de la komisionanoj, feliaan Novan Jaron!*

**La redaktanto**

## Vivplene\*!

**Hugo Mora Poltronieri**

(miamiau@sol.racsaco.cr -San José, Kostariko)

En Kostariko, landeto en Mezameriko, du gejunuloj renkontiĝas surstrate aŭ ie ajn. Jen kiel ili salutas sin reciproke:

- Ĝu vivplene?
- Vivplene!

Preskaŭ neniam ili diras "kiel vi fartas?" aŭ eĉ "Saluton!". Gejunuloj estas naturaj optimistoj. Ili vivas plene, ili estas plenaj je vivo: dum juneco, la vivo ĵajnas rozkolora, promesplena, senfina (la morto estas io, kio okazas al aliaj homoj!). Ni laŭdu tiun optimismon: en lando sen armeo, paco floras. Soldatiĝi, batali, kaj mortigi aŭ esti mortigataj, ne estos iam koŝmaro por tiuj ofte tute nekonsciaj pacamantoj. Oni do ŝuu vivon plene, senzorge...!

Turistoj, kiuj vizitas Kostarikon, tuj ĵatas kaj lernas tian salutmanieron. Kaj ili emas uzi ŝin aĝe kaj en ĝiu situacio. Tamen, atentu! Oni uzu ŝin ĝiam neformale, kun amikoj, ĝenerale junaj: neniam kun superuloj (respektindaj ministroj, seriozaj instruistoj, maltoleremaj bopatrinoj, kaj tiel plu).

Interesaj demandoj estas: ĝu oni salutas tiamaniere ankaŭ en aliaj hispanparolantaj landoj? Ĝu ekzistas io simila en aliaj lingvoj? Ĝu junul-sinteno antaŭ vivo estas same ŝua en gejunuloj alilande?

\* Hispanlingeve: *¡Pura vida!*

### Donacoj al FONDA-O AMERIKO de UEA

(sumoj en eŝroj registritaj ĝis la 15-a de oktobro)

**Argentino:** A. E-Ligo 142,69 **Brazilo:** M. Almada 185,56; S. S. Ledon 92,19; J. R. Piton 24,25 **Finnlando:** anonime 250 gld.; K. Parviala 3,20; T. Sormunen 50 **Germanio** F. Reisel 200 gld. **Hispanio:** L. Souto Vásquez 20,45 **Japanio:** A. Steffes 31,31 **Svedio:** A. Bergh 128,75 **Usono:** Alice Harris 1 850,14; M. Kazuma 14,07; Somera Kursaro S.Francisko 372,55 **Svedio** J. Hammarberg 56,19 **Venezuelo:** J. E. Bachrich 100,00; VEA 13,20. Estis cetere kolektita en la UK-budo la sumo de 260,83 eŝroj. Koran dankon al la donacintoj!

*laŭ Oficiala Informilo de UEA*

La donacoj al tiu Fondaĵo subtenas la diversajn agadojn de Amerika Agado: forsendado de lerno- kaj lego-materialo al nepagipovaj landoj, partoprenigo de aktivuloj en E-aranĝoj, intensigo de informfluo inter amerikaj landoj k.s.

Donacojn oni povas sendi al landa kotizperanto aŭ rekte al *Centra Oficejo de UEA Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. La manierojn transpagi vi trovos en p. 55 de *Jarlibro 1999*. Ne forgesu klare indiki, ke via donaco celas FONDA-ON AMERIKON. Antaŭdankon!



## Sudamerika Vojaĝo (februare-marte 1999) [daŭrigo]

Bill Maxey, landa reprezentanto de Usono en UEA-Komisiono por Ameriko

Dekdu-hora veturado, interrompita meznokte de uniformuloj serĉantaj drogojn, transportis min denove trans la griz-verdan altebenaĵon, kie alpakoĵoj sin paŝtis antaŭ neŝkovritaj vulkanoj. Aliflanke de la landlimo, en Ĥilio, la montetoj iompostiome dezertiis dum la malsuprena serpentado. Mi tranokis en la marborda urbo Arica, sed malmulte dormis. Jam frumatene mi devis pluiri, refoje inter ondoj de grandaj sablodunoj kaj la blua Pacifiko, dum pliaj 24 horoj, ĉis la aĉfurbo Santiago. Tuj post la alveno en tiu urbo, kiu impresis tre moderna sed plaĉe homskala, mi iomete esploris promene. Sekvantage mi kunsidis dum du horoj kun du longtempaj E-istoj. Tiuj, Jorge Tachauer kaj Daniel Zanelle, malgraŭ palpebla pesimismo proponis kelkajn novajn alirojn al la disvastigo de Esperanto en la urbo. Ili ja estis feliĉaj ĉar nuntempe troviĝas novaj ĉiliaj aktivuloj—tamen en aliaj urboj—kiel Héctor Campos, kiun mi vizitis poste en Curicó. Gravulo en la Skolta E-Ligo, li ankaŭ respondecas popularan ret-kurson kaj la aranĝojn por la baldaŭa nacia renkontiĝo. Ĝuste antaŭ mia foriro, loka radio-elsendejo intervjuis nin kaj ĵurnalo fotis por aperonta artikolo.

Tiun saman posttagmezon, Javier García, mezlerneja instruisto pri filozofio, kaj lia lernanto Ludoviko bonvenigis min en Temuco, urbo eĉ pli suda. Mi gastis du tagojn ĉe Javier kaj lia familio. Ludoviko, post nur unu jaro de E-studado, tre lerte parolas la lingvon, kaj li bonvolis esti mia ĉiĉerono en la urbo. Javier estas nekutime fervora partiano de la interna ideo kaj nun multe aktivigas tiuteme en la reto. Mi vizitis ilian lernejon, kie ni tri kune informis pri Esperanto antaŭ ses klasoj.

Unu tagon poste mi troviĝis en Puerto Montt, la plej suda loko de mia vojaĝo, kie mi sensukcese serĉis la UEA-delegiton. De tie mi turnis min orienten kaj veturis al Argentino per speciala aŭtobus-pramĉipa ekskurso tra mirindaĵoj de la fama Lago-regiono. Pro la tiutaga nuba-pluva vetero, la reklame promesitaj vulkanoj forestis, tamen ne mankis grandaj lagoj kaj densaj virgaj arbaroj.

En Bariloche, kie aŭtuno jam komencis sentiĝi sin, mi bonĉancis trovi min meze de aparte ridetema kaj bonkora rondo. Ties longtempa gvidanto estas d-ro Werner Schad, ĉe kiu mi gastis. Pro mia rapidega traŭrado de Ĥilio, la ĉanco restadi en unu loko dum tuta semajno estis bonvenega. Jam la unuan tagon mi partoprenis kunvenon de E-istoj el la tuta regiono. En loka gastejo ni longe babiladis, formanĉante ĉiele bongustajn tortojn kaj kukojn. En postaj tagoj vere ŝojigis min pasigi po kelkajn horojn individue kun ses karaj samideanoj. Tiuj sinofere veturigis min laŭ belegaj aŭtovojoj, promenigis min en la arbaroj, aŭ temanĉigis min ĉis supersatiĝo. Unu el tiuj estis la koninda Alejandro Cossavella, 1998a premiito pri kanto en la belarta konkurso de UEA.

Post la nun kutimaj ŝisrevidoj, mi enbusiĝis por fari la lastan etapon de la vojaĝo. Longa kaj laciga veturado alportis min al varma Bonaero, kie mi ŝojis vidi en la stacidomo la vizaĉon de usona amiko Enrique Ellemberg. Ni iris rekte al la laborejo de Pablo León, kiu malavare proponis al mi sian apartamento en la urbocentro. En la sidejo de la Argentina E-Ligo atendis min la rideto de amikino Silvia Rottenberg, inter pluraj novaj kunlaborantoj, inkluzive de Rubén Diaconu, el fora urbo Saenz Peña, kolego mia en la Komisiono por Ameriko. (Estis li kiu enkondukis min al la iom dubindaj plezuroj de la tradicia mateo-sorbado). Kroma agrablaĵo estis konatiĝi kun d-ro Rainer Kurz, el Germanio, kiu vizitas Argentinon dum tri monatoj.

La argentinanoj ja posedas enviindan sidejon, tamen—same kiel aliaj grupoj—ili daŭre luktadas pro manko de mono kaj aliaj rimedoj. Tiaj malfacilaĵoj estis la ĉefa temo dum mia vizito. Tamen tiuj diskutoj neniel malhelpis ke ni gaje kunpromenu en la turismaj kvartaloj kaj amuziĝu en la etoso de la eleganta aĉfurbo. Sed post kvin tagoj refoje aŭdiĉis kortuĉaj adiaĉoj antaŭ mia longa flugo al Miami.

La vizaĉoj de tiuj preskaŭ 50 samideanoj en la sudaj landoj restas bele fiksitaj en mia memoro. Ili estas plejparte junaj kaj entuziasmaj, idealismaj kaj modernaj. Plimulto estas profesiuloj, kaj multaj aktive uzas la Interretan por tre diversaj E-aferoj. Ili impresas agemaj, sindediĉaj, kaj eĉ "malsataj." Ili estas pensemaj homoj kun trafaj kaj nuntempaj ideoj, tamen ofte sen spertoj kaj informoj rilate la E-movadon. Sed la plej frapa konstato estas ke ili iel sentas ke Esperanto kapablas ĉanĉi al ili la vivon. Kaj ĝuste en tiu intuicia konfidemo kuĉas ilia espero kaj mia inspiro. La tempo inter tiaj homoj multiel pliriĉigis mian vivon, valorante la penon kaj monon. Mi senhezite kaj elkore rekomendus similan vojaĉon al ĉiu kiu daŭre serĉas kialon por aktivi en la E-komunumo—kaj en la pli vasta mondo.

*Bill Maxey (Usono)*



## Nova agado en Gvatemalo

**Antonio González Fernández**

Profesoro pri filozofio,  
Universidad Rafael Landívar, Gvatemalo

En sabato 23-10-99 mi havis prelegon pri esperanto en mia Universitato Rafael Landívar, Gvatemal-urbo. La salono estis preskaŭ plena je studentoj pri lingvistiko. La plimulto de ili estas majaoj, viroj kaj virinoj el diversaj gentgrupoj kaj lingvoj, kiuj studas en speciala programo por fariĝi du-lingvaj instruistoj. Tio signifas, ke ili deziras esti instruistoj, kiuj povas instrui en la hispana kaj en la propra majaa lingvo. Post la fino de la interna milito inter la armeo kaj la gerilo, en la pac-interligo oni antaŭvidis la rajton de la majaoj esti instruataj en sia propra lingvo, kaj ne nur en la hispana.

La nuna registaro komencis projekton por du-lingva instruado. Mia universitato (kaj aliaj universitatoj) pretigas tiujn instruistojn por la estonta kaj tre bezonata tasko. La studentoj estas majaoj, sed ili neniam studis science la propran lingvon, kaj eĉ ili, tute majaaĵ, ne povas bone instrui la propran lingvon al iliaj kungentanoj. Tial la publiko, kiu aĉestis en la prelego estis tre konscia pri esperantaj temoj kiel lingva demokratio kaj protektado de la malgrandaj lingvoj.

Post kelkaj ĝeneralaj informoj pri la esperanta lingvo kaj pri la celoj de esperantismo, mi parolis al ili pri la programo "Indiĝenaj Dialogoj", en kiu mi havis la ĉancon partopreni kiel "onklo" (tio estas, helpanto al partoprenanto dum la unuaj fazoj de la programo). Tiu ĉi programo multe interesigis ilin. Kun mi aĉestis Edgar Oliva, gvatemala esperantisto, kiu rakontis al la

## El nia Amerika Tirkesto:



**LATINAMERIKA ESPERANTISTO**

*Monata propaganda gazeto, oficiala organo de la Latinamerika Esperantista Ligo kaj de la Societo Kuba por la propagando de Esperanto. Ĝi estas eldonata hispane kaj esperante, kun belaj gravuraĵoj. Ĝi celas la disvastigon de Esperanto en la hispanparolantaj popoloj el Ameriko.*

*La jara abono kostas tri spesmilojn (1.50 dolaroj aŭ ilia ekvivalento). Specimenan numeron kaj propagandan broŝuron oni sendas kontraŭ du respondkuponoj.*

**LATINAMERIKA ESPERANTISTO**  
**APARTADO, 1324. — HABANA — CUBA**

## THORSEN-APOGO AL BIBLIOTEKOJ

UEA disdonis por la tria fojo subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Entute 14 Esperanto-bibliotekoj sendis peton. La komisiono aparte ghojis, ke unuafoje venis petoj ankau el Sud-Ameriko. La UEA-estrarano pri kulturo Tacuo Huøimoto, ĝenerala sekretario Michela Lipari kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller dividis la aĝ-jare disponeblan sumon de 1825 eŭroj inter 9 petintoj. Ili aĝuj ricevas librojn surbaze de siaj dezirlistoj.

El Ameriko la aĝjaraj subvencioj estas:

- Bariloĉa Esperanto-Rondo, Argentino (EUR 275)
- Bona Espero, Brazilo (EUR 250)
- Pernambuka Esperanto-Asocio, Brazilo (EUR 275)

La aliaj bibliotekoj troviĝas en Aĝinio, Francio, Hispanio, Italio, Madagaskaro kaj Ukrainio.

Petoj por la aljuo en 2000 devos atingi la Centran Oficejon de UEA ois la 15-a de oktobro 2000. Ili devas konsisti el listo de dezirataj libroj ordigitaj laŭ prefero, aar la subvenciojn oni ricevas ne kiel monon sed kiel librojn. Bonvenas ankaŭ priskribo pri la biblioteko. Konsiderataj estas nur bibliotekoj ne financataj de ŝtata, urba aŭ alia ekstermovada instanco.

(surbaze de gazetara komuniko de UEA, nov/99)

aŝskultantoj la historion de la esperanto-movado en Gvatemalo. Mi pensas, ke la aŝskultantoj tre bone reagis antaŭ la prelego. Multaj demandis pri aĝeto de esperantaj lerno-libroj. Ankaŭ la aŝtoritatoj de la universitato bone reagis. Mi pensas, ke la ebleco estas granda, ke mi povos oferti esperanto-kurson por tiu grupo dum la venonta jaro, de aŝgusto ois novembro. Mi pensas, ke se la indiĝenoj interesioos pri esperanto, la movado havas bonajn ĉancojn por la estonteco.

Kontaktadreso: [agonzale@mail.url.edu.gt](mailto:agonzale@mail.url.edu.gt)



*Kuba antaŭafrankita poŝtkarto (el 1916) kun dorsflanka propagando pri Latinamerika E-isto. Tiu revuo ekzistis, redaktita de Alemán Ruiz, inter la jaroj 1916 kaj 1917. Ni dankas pro la historia informo sendita de nia amiko s-ro Jean AMOUROUX (Perpignan, Francio)!*

## EN LAND' EN LAND' EN LAND' EN LAND' EN LAND'

### Argentino

Post la **53-a Argentina Kongreso de Esperanto** (San Carlos de Bariloche, de la 8-a ĝis 11-a de Oktobro), d-ro Werner Schad, sekretario de la loka grupo, kaj d-ro José Vergara Olivarría (Æilio) ekentreprenos interlandan kunlaboron. Ili starigos Esperanto-rondon en Puerto Montt, ĉilia urbo ne malproksima al tiu landlimo, kie d-ro Vergara estas loka UEA-Delegito.

### Brazilo

Brazila esperantistaro estas ege entuziasma pro la akcepto de invito de Brazila E-Ligo pridebatita en Berlino. UEA-Komitato aprobis la okazigon de la **87-a Universala Kongreso** en nordorienta provinca ĉefurbo Fortaleza, en la jaro 2002. En tiu bela marborda kaj turisma urbo troviĝas vigla Asocio kaj movado, kun radio-elsendoj kaj plentempaj kursoj en oficiala fako de Federacia Universitato.

La atento al regiona kunlaboro kreskas ankaŭ interne de tiu lando. En urbo Uberlândia, Minas Gerais, loka klubo organizis **Seminarion pri Esperanto kaj Esperantismo** kunlabore kun aliaj grupoj de tiu provinco por pridiskuti la movadon.

Ducentan diplomiton atingis la **portugallingva retkurso CER**. Kunordigata de D-ro José Lunazzi, la dekleciona reta kurso estas senpaga kaj kalkulas je kvardeko da volontulaj korektantoj tra la lando kaj en Portugalio. Post ĉirkaŭ tri jaroj, la unuan lecionon de CER jam kopiis pli ol tri mil interesatoj. Multaj diplomitoj jam engaĝiĝis al la "malvirtuala" E-movado.

### Kolombio

Post la Tutamerika Kongreso en Bogoto kaj restarigo de sia Landa Asocio, kolombiaj esperantistoj okazigis sian Kvinan nacian Kongreson en Ibageo (16-18 okt.). I.a. oni decidis krei junularan sekcion, kiu estonte petos aliĝon al TEJO.

### Kostariko

En Berlino, la Komitato de UEA formale akceptis KREA-n kiel **Landan Asocion**.

Nacia kunveno okazos la 18-an de Decembro. Ĝia lanĉota bulteno havos la titolon "Vivplene!", kies signifon por tiu pacama lando oni legas sur la unua paĝo de tiu ĉi *AktivAmeriko*.

### Peruo

Laŭ iniciato de Julio E. Zevallos Gómez kaj aliaj esperantistoj, en Oktobro oni lanĉis **Peruan Esperantan Bultenon** en Internet. Ĝia adreso: <http://www.geocities.com/amikoj>. Dua numero sekvos en Decembro. Ideojn kaj demandojn oni sendu al [pesbult@yahoo.com](mailto:pesbult@yahoo.com).

### Usono

Post ties landa kongreso en julio, okazis 3-taga **seminario pri instruado**, gvidata de prof-ro Duncan Charters. Ĝin partoprenis 13 homoj.

*kompilita laŭ informoj de la respektivaj landaj komisionanoj*

## EN LAND' EN LAND' EN LAND' EN LAND' EN LAND'

## AktivAmeriko

*Novaĵetero de UEA-Komisiono por Ameriko  
aperas dufoje en la jaro (Jun kaj Dec)*

### **Redaktanto**

*James Rezende Piton*

✉ Av. João Batista M. do Canto, 257/J2  
Campinas (SP), BR-13031-210, Brazilo  
☎ kaj 📠 +55 (19) 272 5212  
✉ [james.piton@iname.com](mailto:james.piton@iname.com)

### **KOMISIONO**

#### **UEA-Komisiito por Ameriko**

Atilio ORELLANA ROJAS

✉ Riouwstraat 172, NL-2585 HW  
Den Haag, Nederlando  
☎ +31 (70) 355 6677  
📠 +31 (70) 358 4422  
✉ [iei001@worldonline.nl](mailto:iei001@worldonline.nl)

#### **UEA-estrarano (Landa Agado)**

Renato CORSETTI (Palestrina, IT)

#### **Argentino**

Rubén DIACONU TKACHENCO (S.Peña)

#### **Brazilo**

James REZENDE PITON (Campinas)

#### **Kanado**

Suzanne CARON-RICHER (Toronto)

#### **Kostariko**

Hugo MORA POLTRONIERI (San José)

#### **Kubo**

Juan Ramón RODRIGUEZ (La Habana)

#### **Meksiko**

Leonora TORRES y TORRES (México)

#### **Usono**

Bill MAXEY (Powhatan)

#### **Venezuelo**

Juan Eduardo BACHRICH (Caracas)

### UEA-Komisiono por Ameriko



Estas necese sendi legomaterialon al kelkaj landoj de Meza Ameriko.

Se en viaj bibliotekoj aŭ en la biblioteko de viaj kluboj troviĝas duoblaĵoj, bv. informi la Komisiiton pri la titoloj. Li indikos kion sendi kien, kaj *Fondaĵo Ameriko* kovros viajn sendokostojn.